

02674 (france *voie déviée*) koncernas kurban vojon en rekta trakforno kaj malgrandradiusan vojon en kurba trakforno. La ĝisnuna termino „deturna branĉvojo“ trafas la nocion, sed la adjektivo „deturna“ superfluas.

Sekve: Duvoja trakforno (simboloj a ... d) havas 1 trunkvojon kaj 1 branĉvojon.

Trivoja trakforno (simbolo e) havas 1 trunkvojon kaj 2 branĉvojn.

Unuoble liga kructrakforno (simbolo f) havas 2 trunkvojn kaj 1 branĉvojon.

Duoble liga kructrakforno (simbolo g) havas 2 trunkvojn kaj 2 branĉvojn.

En RailLexic ĝis nun tute mankas la nocioj koncernantaj direkton de la branĉvojo, rilate al la trunkvojo en kurbaj trakfornoj. Unuaj proponoj estu „internenkurba trakforno“ (c, ĉ) kaj „eksterenkurba trakforno“ (d).

Resumo de la demandoj, de ĉi tie kaj el TeKu 114

Bonvolu respondi la demandojn ĝis marto 2002, por ke la respondoj aperu en la kongresprepara TeKu 116.

1. Ĉu vi kontentas pri konservo de la termino „trakaparato“ por RailLexic 00406 (simboloj a ... h), aŭ havas alian proponon?
2. Ĉu vi kontentas pri la proponita termino „kructrakforno“ por RailLexic 09392 (09393, 09398) (simboloj f, g), aŭ havas alian proponon?
3. Ĉu vi preferas la epitetojn „unuoble / duoble liga“ aŭ „unubranĉa / dubranĉa“ al „kructrakforno“ por RailLexic 09398 kaj 09393 (simboloj f, g)?
4. Ĉu vi kontentas pri la proponita termino „trunkvojo“ por rekta vojo en rekta trakforno (simboloj a, b, e, f, g) kaj por grandradiusa vojo en kurba trakforno (simboloj c ... d), aŭ havas alian proponon?
5. Ĉu vi kontentas pri la proponitaj terminoj „internenkurba trakforno“ (simboloj c, ĉ) kaj „eksterenkurba trakforno“ (simbolo d), aŭ havas alian proponon?
6. Ĉu vi preferas la terminon „senmotoro vagono“ aŭ „remorka vagono“ por ĉiuj vagonoj sen propulsinstalaĵo (bildoj b, c, e, f, g sur paĝo 2 de TeKu 114) laŭ la klarigoj sur paĝo 4/5 de TeKu 114?
7. Ĉu vi preferas la terminon „remorka vagono“ aŭ „senpropulsa motoruma vagono“ por tiuj vagonoj sen propulsinstalaĵo, kiuj laŭtipe estas destinitaj por uzo nur kune kun samtipaj motorvagonoj (bildoj b, c sur paĝo 2 de TeKu 114)?
8. Ĉu vi preferas la terminon „remorka vagono sen kondukistejo“, „simpla remorka vagono“ aŭ „simpla motoruma vagono“ por vagonoj sen propulsinstalaĵo, sen kondukistejo kaj uzataj nur en motorvagonaroj (bildo b sur paĝo 2 de TeKu 114)?
9. Kiun difinon en via nacia faklingvo havas la termino *tender*, *tendr* aŭ simila; ĉu ĝi respondas al solvo a aŭ al solvo b laŭ la skemoj sur paĝo 6 de TeKu 114?

Gajajn festotagojn, sanon, sukceson kaj ĝojon dum la jaro 2002 elkore deziras

Heinz Hoffmann.



Terminara Kuriero

TeKu 115

Novembro 2001

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj de nia faklingvo!

Baldaŭ la jaro finiĝos. Estas tempo por apero de nova TeKu kun informoj pri plenumo de la lastaj taskoj kaj kun trakto de novaj.

Mi komencas pri la lasta alvoko en TeKu 114: Inter la paĝoj 4 kaj 5 ni aldonis respondilon kaj petis plenigi ĝin ĝis fine de aŭgusto. Alvenis nur 6 respondoj, nome de Emil Tudorache, Erik Mortensen, E. Henning Olsen, Ferenc Kapcsándi, Alfonz Moró kaj Ferenc Phersy. Dankon al tiuj kolegoj. Por la aliaj sekcianoj restas la peto, baldaŭ respondi kaj sendi al mi.



Pri la **tendro-problemo** mi ricevis nur 1 rezulton, nome de Emil Tudorache. En Rumanio, tendro (*tender*) estas aŭ aparta tendro aŭ surlokomotiva tendro - do tie validas solvo a kiel en Germanio. Mi denove petas kunlaborantojn en aliaj landoj, esplori pri tio en nacilingva literaturo (normoj, leksikonoj ktp).


La 30-an de oktobro en Parizo okazis **3-a kunsido de la laborkolektivo MT40**. Partoprenis Birgit Hoppe de UIC, Stephan Arra de SNCF (Francio), Juha-Heikki Pasanen de RHK (Finnlando), Bo Persson de Banverket (Svedio) kaj mi de IFEF. Dum 8-hora laboro estis difine klarigata la proponita sistemigo, kaj elektataj taŭgaj terminoj anglaj, francaj kaj germanaj por 4 kompleksoj da veturilnocioj. Restas kelkaj duboj, pri kiuj Birgit Hoppe demandos specialistojn en UIC-sidejo kaj vagonkonstrua industrio. Pri la finaj rezultoj mi informos en alia TeKu. En kaj por Esperanto ni jam traktis tion kaj trovis solvojn. La sekva kunsido laŭplane okazos en majo 2002 en Stokholmo. Kvankam la trakto de fako MT40 probable daŭros ankoraŭ-minimume 1 jaron, Birgit Hoppe jam proponis sekvan traktandan fakon: „trakfornoj“ (parto de BT40). Mi pensas ke por plenigi la nunan paŭzon ĝis novaj MT40-taskoj, ni kaptu la novan proponon, do komencu okupiĝi pri trakfornoj kaj trakokrucaĵoj.

Heinz Hoffmann

Trakforkoj kaj trakokrucaĵoj

Por tiuj ambaŭ nocioj ekzistas en RailLexic 00406 supernocio, kies Esperanto-termino ĝis nun estas „trakaparato“, traduko el la franca *appareil de voie*. La PIV-difino de „aparato 1“ tekstas: „Kompleto aŭ mekanismo, aplikanta fizikan aŭ kemian fenomenon; por atingi specialan efikon.“ Estas pripensinde, ĉu konservi la terminon „trakaparato“ aŭ elekti novan.

Anstataŭ difinoj por specoj de trakaparatoj, jen simboloj uzataj en trakoskemoj. La sekvaj terminoj kun demandosigno estas diskutindaj en nia sekcio.



a ...h	00406	trakaparato?	
a ... g	00174	trakforko	
a ... d	01041	duvoja trakforko	
a, b	00181	simpla trakforko	
a, c	01042	dekstrabranĉa trakforko	
b, ĉ	01043	maldekstrabranĉa trakforko	
a, b, e, f, g	—	rekta trakforko	
c ... d	01040	kurba trakforko	
c, ĉ	—	internenkurba trakforko?	
d	—	eksterenkurba trakforko?	
e	01045	trivoja trakforko	
f, g	09392	kructrakforko?	
f	09398	unuoble liga kructrakforko?	unubranĉa kructrakforko?
g	09393	duoble liga kructrakforko?	dubranĉa kructrakforko?
ĝ, h	09404	trakokrucaĵo	
ĝ	09405	rekta trakokrucaĵo	
h	—	kurba trakokrucaĵo	

Por kolegoj ne sufiĉe komprenantaj la simbolojn, helpu la foto sur paĝo 3:

supre: maldekstrabranĉa simpla trakforko (simbolo b)
maldekstre: unuoble liga / unubranĉa kructrakforko (simbolo f)
dekstre: duoble liga / dubranĉa kructrakforko (simbolo g)



Notoj

- RailLexic 01040: La termino „kurba trakforko“ estas sufiĉe klara kaj pli konciza ol la sinonimo „trakforko en kurbiĝo“.
- RailLexic 01041, 01042, 01043: En la ĝisnunaj terminoj „simpla (duvoja) trakforko“ (01041), „simpla dekstrabranĉa trakforko“ (01042) kaj „simpla maldekstrabranĉa trakforko“ (01043), la adjektivo „simpla“ ne ĝustas, ĉar ĝi nur koncernas trakforkojn laŭ simboloj a, b. Kvankam ekzistas kaj simetriaj kaj nesimetriaj trakforkoj, la traduko de la franca originalo *branchement à trois voies* koncernas ĉiujn trivojajn trakforkojn.
- RailLexic 01045: Temas pri kombinaĵoj el trakforkoj kaj trakokrucaĵo. La ĝis nun sama termino „trakokrucaĵo“ kaj por tiaj kombinaĵoj laŭ simboloj f, g (france *traversée-jonction*, germane *Kreuzungsweiche*) kaj por nuraj krucaĵoj laŭ simboloj ĝ, h (france *traversée ordinaire*, germane *Kreuzung*) ne estas ĝusta. La termino „trakokrucaĵo“ restu sole por RailLexic 09404. Por la kombinaĵoj estu unua propono „kructrakforko“.
- RailLexic 09392, 09393, 09398: Por la kructrakforko laŭ simbolo f, la epiteto „unuoble liga“ estu unua propono por anstataŭigi la ĝisnunan epiteton „simple liga“. La vorto „simple“ havas pli vastan signifon ol la vorto „unuoble“. Dua propono estu la epiteto „unubranĉa“ (por RailLexic 09393: „dubranĉa“).

En RailLexic ĝis nun ne tute klaras, kiuj nocioj koncernas la diversajn vojojn en trakforko. Verŝajne RailLexic 09737 (france *voie courante*) koncernas rektan vojon en rekta trakforko kaj grandradiusan vojon en kurba trakforko. La ĝisnuna termino „traitrako“ ne trafas la nocion. Unua propono estu „trunkvojo“. Verŝajne RailLexic